Dum la politikistoj kastilileone politikumadis, mi omaĝis la regionon per kreado de artikoloj en Vikipedio pri municipoj de provincoj Salamanko kaj Zamoro. Multaj povas pridemandi kiel tio povas utili, ekzemple artikolo pri perdita loĝloko de eble 40 loĝantoj. Eble ili pravas, sed (krom la fanfaronado pri nombro de artikoloj fare de la esperanta komunumo) iu iam povas vidi artikolojn pri tiu aŭ alia loĝloko en la regiono en iu ajn lingvo en la mondo kaj rigardi en la listo de lingvoj kaj gapi, ke tio estas ankaŭ en Esperanto, kaj foje per pli kvalita priskribo ol en gravaj tutmondaj lingvoj ktp. Foje esperantistoj vizitas la regionon aŭ interesiĝas prie: kompreneble informo en nia propra komuna lingvo ege utilos kaj plaĉos. Mi jam ofte instigis esperantistojn kaj precipe hispanajn esperantistojn pri la graveco kreadi tiajn artikolojn, pro kio mi nun ne insistos prie kaj iros rekte al konsiloj kaj malkovroj kiel oni povas krei facile artikolojn, almenaŭ de kelkaj tipoj, ne por apartaj unuopaj artikoloj, sed ekzemple por krei serion de artikoloj pri similaj elementoj, ekzemple municipoj de difinita provinco.

Kelkaj gapas kiel mi povas krei centojn da artikoloj tiom rapide. Estas iloj kiuj ebligas tion. La plej simpla estas ripeti skeleton. Artikolo komencu per ŝablono `{{Informkesto urbo|regiono-ISO=ES-ZA|situo sur mapo2=Hispanio}}` aŭ pli simple `{{Informkesto urbo|regiono-ISO=ES-ZA}}` kio videbligas dekstran tabelon de informoj kiuj aperas aŭtomate. Se oni celas aliajn provincojn ekzemple Burgoso simple anstataŭu ZA al BU ktp. Poste sekvas la skeleto, ekzemple:

"Quintanilla de Raros" [kintaNIlja deRARos] estas [[municipo]] de la [[provinco Zamoro]], en la regiono [[Kastilio-Leono]], [[Hispanio]]. Ĝi apartenas al komarko [[Volapuko]], en la centro de la provinco. "Quintanilla de Raros" estas etimologie tradukebla al "Bieneto de Normaluloj". Ĝia municipa teritorio estas formata de unusola loĝloko, okupas totalan areon de 54,39 km<sup>2</sup> kaj laŭ la demografia informo de la municipa censo fare de la [[INE]] en 2021, ĝi havis 332 loĝantojn. Ĝi perdis ĉirkaŭ 800 loĝantojn el la mezo de la [[20-a jarcento]] pro la migrado el ruraj zonoj al urboj. Ĝi distas 55 km de [[Zamoro]], provinca ĉefurbo, kaj 25 km de [[Benavente]]. Estas atestaĵoj de prahistoria loĝado; en Mezepoko okazis reloĝado. Ĝi apartenis al la Regno Leono. Tradiciaj enspezofontoj estas agrikulturo kaj brutobredado. Lastatempe kultura kaj [[rura turismo]] plie ekgravis (popola arkitekturo, vinkeloj, ponto, piedirado).

Tiu skeleto povas ripetiĝi ŝanĝinte la koncernajn datumojn, aldonante kelkajn informojn pri historio, kuriozaĵoj, ekonomio ktp. La grupigo per komarkoj aŭ similaj grupoj permesas la ripeton de tiu skeleto ekzemple dudek fojojn, kio ŝparas energion. Plej ofte ĉiuj municipoj de iu komarko trapasis similajn historiajn etapojn, vivtenas sin per simila ekonomio, suferas similan senlonloĝigadon ktp. Eĉ por trairi al apuda komarko, eblas ŝanĝi nur la koncernajn diferencojn. Tiel la skeleto povas ripetiĝi centojn da fojoj. Por aliri al alia provinco eblas ŝanĝi nur la koncernajn diferencojn. Tiel la skeleto povas ripetiĝi milojn da fojoj. Kaj tiel plu.

Se vi ne interesiĝas pri tiu temo, simila sistemo povas esti uzata por plantoj, animaloj, verkistoj, muzikistoj, filmoj, aktoroj ktp. Por eviti robotajn rezultojn kompreneble ĉiam indas aldoni iun specifajon. Tio kontentigas la tempon "perditan" en tiu senfina laboro, sed kiu povas esti ege utila al la komunumo. Kompreneble se vi kreas apartan artikolon pri via preferata aktorino, poste alian pri iu planto kiun vi vidis per televido, poste pri libro kiun vi jŭs legis ktp., tiu mekanismo ne tiom facile utilos.

Ankaŭ la finaj teknikaĵoj povas esti ripetitaj:

== Vidu ankaŭ == \* [[Municipoj de Provinco Zamoro]] ==Notoj== <references/> {{Bibliotekoj}} [[Kategorio:Municipoj de la provinco Zamoro]]

Mi rememorigas, ke jam estas farita la suda duono de la lando, do mankas nordaj regionoj kaj la insularoj, kie io estas farita, sed ankaŭ multo mankas. Kuraĝe, ek!

Kani

---

## POEZIA ANGULO -HAJKOJ-

La malesperon  
Ornamas la poeto  
Sur la papero.

Vekiĝu suno!  
Ĉar la frostigita kamp'  
Bezonas lumon.



Muziko sonas  
Dum verkas la soleco,  
Poemon novan.

Ángel Arquillos

# LA STRANGA ANGULO

## Ĉapitro 4a

Kiel ne havi tempon Jes, mi scias. Neniu pli fakas ol vi pri ĉi tiu temo. Vi ĉiutage plendas pri la fakto ne havi tempon. Vi imagas aliajn ulojn, kiuj certe havas pli facilan vivon ol vi. Dum vi penege klopodas solvi aferojn, ili ĝuas la vivon. Do eble vi ne bezonas legi ĉi tion. Sed se vi estas tia homo, mi scias, ke vi deziras legi ĉi tiujn malpravaĵojn pro la scivolemo kontroli, ĉu mi tiom fakas kiel vi. Do ni eniru en la aferon. Ni imagu konkretan homon kaj nomu lin aŭ ŝin Keke. Saluton, Keke. Hodiaŭ vi estas la ĉefrolulo. Kiel Keke atingis esti tia homo, kiu neniam havas tempon?

1. Sentu la bezonon solvi la misfunkciadojn de la mondo Keke promenas sur la surfaco de la tero rimarkante, ke kelkaj aferoj ne bone funkcias kaj ke pro tio la rezultoj estas klare bonigeblaj. Aŭtomate Keke tuj sentas sur la ŝultroj la pezon de la respondeco solvi tion. Eble Keke ĉirkaŭatas de mallertuloj, komfortemuloj, egoismuloj kaj aliaj specoj de muloj. Ĉar la mondo ne povas solviĝi sen tiu partopreno, Keke akceptas enmeti tiun novan taskon en sian agendon, kien matematike oni ne povas enmeti ion pli.

2. Klopodu konvinki vin, ke ĉi tio estas nur escepto kaj alvenos pli paca jararo Fumantoj estas fakuloj pri ĉi tiu temo. Ili kutime asertas, ke ĉi tiu estos la lasta cigareto aŭ ke mi kapablas halti tiam, kiam mi elektos. Same okazas al ludo-dependulo. Same rilate al ĉia dependeco. Jes, vera fakulo pri la nehavado de tempo scias, kiel konvinki sin mem, redirante, ke ĉi tiu nuntempo nur estas momento, ke baldaŭ oni trapasos la streson. Pro tio Keke ĉiam asertas, ke "okazas, ke nun estas malfacila momento, sed tio nur estas nun. Poste mi pli bone enspiros".

3. Plenigu vian vivon de aparatoj Eble ĉi tiu ŝajna stultaĵo estas la plej potenĉava maniero manĝi eĉ la lastan peceton de sekundo el via agendo. Plie, ĉi tio atingos detrui vian tutan agendon se vi havas taŭgan sorton. Feliĉe temas pri facilega atingo. Oni aĉetu multe da elektronikaĵoj kaj aliaj aparatoj. Bonega akiraĵo estas nova kuirmaŝino, nova mueligilo de io, nova tranĉilo, nova io, kiu precipe estu elektronika. Keke sentas, ke oni nur bezonas decidi kaj aĉeti. Poste en la domo oni bezonas legi, ĉefe post la fiasko klopodante funkciigi la aparaton. Ĉiam post malpli da tempo ol la atendo, la aĉetitaĵo lasas funkcii, paneas aŭ eĉ eksplodas aŭ bruliĝas. Keke koleras kaj bezonas tempon telefonvoki, plendi, ripari ĝin, denonci... aŭ esplori, kiel oni mem povas solvi tion.

4. Mensogu vin: ĉi tiu nova softvaro simpligos mian vivon Aparatoj? Misfunkciadoj? Esceptoj? Ne! Softvaro! Se vi kapablas trovi pli bonan tempomanĝilon ol softvaron (oni legu ankaŭ apon) skribu min. Keke kaj mi dankos vian zorgon. Oni diras, ke Dio ripozis je la 7a tago. Tio ne veras. Ĵus post la laboro de la sesa, Dio ricevis novan vindozan version aŭ novan helpilon de guglo, kiu sukcese kapablis fiaskigi la planojn de la sepa tago. Keke jam ne scias klarigi tion, kion faras konkreta komputila aŭ poŝtelefona softvaro. Eble ĝi helpas aranĝi la helparanĝilojn. Unu el la plej bonaj decidoj por perdi vian tutan tagon estas elŝuti ion. Ne gravas kion. Elŝutu, elŝutu. Se vi hezitas, prenu la kutiman pensaĵon "Ĉi tiu elŝutaĵo iel helpos min pli bone solvi ion".



5. Engaĝiĝu al aliaj homoj Ofte homoj, kiuj ĉiam plendas pri manko de tempo, emas engaĝiĝi. Ne tion rilatas al si mem, sed al aliaj. La sento, ke se oni engaĝiĝis oni respondecas, estas morala muskolo. Tio signifas, ke la etika menso fartas bone. Pro tio, se vi estas iu el tiuj homoj, kies etika muskolo bone funkcias, engaĝiĝu rapide sinsekve daŭre. Kiam vi konscios pri la kvanto da engaĝigoj, jam estos malfruo. Same okazas, se vi tiom rapide manĝas, ke ne lasas tempon al stomako sendi informon al via cerbo. Kiam vi konscios, via korpo estos ĉe la limo eksplodi.

6. Sinsekve pretiĝu por la estonteco Ĉio povas okazi. Eble la angla lingvo perdos sian nunan postenon, alvenos la regado de la ĉina kaj trovos vin sen scii eĉ unu ideogramon. Eble via entrepreno fiaskos kaj vi malkovros, ke vi scias nenion, kiu utilas por aliaj laboroj. Eble vi subite naskos aŭ naskigos dek gefilojn, kiuj bezonos de vi neimageblajn rimedojn, kiujn vi nun ne havas. Eble eblos tiom da eblaĵoj, ke vi ne rajtas ripozi. Moviĝu! Imagu la estontecon! Pretiĝu! Ĉiuj tion faras nun. Ĉu vi estos la ununura, kiu restos en la stacidomo rigardante la forkuradon de la trajno?

7. Konkuru kun vi mem Defiu vin. Ĉu vi kapablos lerni alian lingvon, studi alian kurson, parkerigi alian tekston, viziti alian landon? Pli bone organizi vian senfinan fotaron? Bonvole ne lasu vin en paco. La preferata metodo de Keke estas atingi novan rekordon finante stultan serion aŭ ĉapitraron. Keke neniam diras "stulta", sed pli bone "konsilita" aŭ "spektinda". Mi havas alian mirinda metodon: legi librojn pri, kiel bone organizi la tempon. Usonanoj estas vere kapablaj produktemaj homoj. Ĉiutage almenaŭ unu el ili publikigas novan metodon havi sukceson en la vivo. Oni nepre devas legi tion, ĉu?

8. Havu ĉiam preta la jeson kiam iu ajn proponas vin eniri en ties tujmesaĝilon Fiaskulo estas tiu homo, kiu havas tiom da libera tempo, ke li aŭ ŝi nur partoprenas tri aŭ kvar ŭacapajn grupojn, kiuj donacas malpli ol cent mesaĝojn ĉiutage. Mesaĝoj devas esti tiaj: "Ha ha ha" "Hi hi hi" "Ho hi ha" kaj similaj. Oni akceptu ankaŭ ĉiujn emociikonojn. Se post dek mesaĝoj unu el ili indas, Keke iras al alia grupo malpli instruema. Miaj preferataj estas videaj ŝercoj, fotoj de hejmbestoj kaj ĉefe avertoj pri la malbona konduto de famuloj, mensogo de politikistoj, novaj virusoj, vizitoj de eksterteranoj kaj aliaj similaj literaturaĵoj. Ĉiam havu vian poŝtelefonon krianta, avertanta vin, ke novaj cent tujmesaĝoj tuj bezonos vian tujan reagon. Se vi alvenis ĉi tien, se vi legis ĉion, eble vi bezonas helpon, ĉar tio signifas, ke vi ankoraŭ havas tempon. Ne maltrankviliĝu. Elektu nur du el ĉi tiuj konsiloj. Elkore okupiĝu pri la takso kaj vi atingos tian altnivelan sukceson, ke mi neniam tion scios, ĉar vi ne kapablos havi eĉ unu sekundon informi min.

Antaŭgratulon!

Verkis Viko.

# **Pri IKIKO 2021**

## **kaj antaŭalvoko por IKIKO 2022**

### **El kie aperis IKIKO**

Danke al pluraj renkontiĝoj inter esperantistoj, kiuj malkontentis pri la maniero aranĝi internaciajn kunvenojn, naskiĝis la projekto IKIKO. La nomo estas akronimo de Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado.

La internaciaj kongresoj estas bona ekzemplo pri malekvilibro pro la fakto, ke ĉiuj partoprenantoj devas adaptiĝi al hegemoniaj lingvo kaj kulturo, al la loka tempo kaj al la teknikaro. Ankaŭ la ambicia kampo de la scio nomita Interkultura Komunikado pleniĝas de produktadoj, konceptoj kaj referencoj alvenataj ĉefe de la usona fabriko, tiel ke oni rajtas dubi ĉu la rezulto de la fabriko vere estas interkultura.

Pro ambaŭ flankoj, tiuj esperantistoj celis provi novan stilon.

### **Kio estas IKIKO**

La maniero solvi tiujn defiojn estas la jena:

1. La tuta kongreso aranĝiĝas kiel kongresaro. Do IKIKO estas kongreso de kongresoj.
2. Ĉiu partoprenanta kongreso nomiĝas sidejo.
3. Ĉiu sidejo elektas sian horaron, lingvon kaj stilon. Ĝi elektas ankaŭ ĉu la sperto okazos ĉeeste, neĉeeste aŭ miksan ambaŭ.
4. La Esperanta entrepreno, Civiciencia, okupiĝas pri ĉio, kiu rilatas al la teknika flanko
5. La Centra Organiza Grupo, COG, kie estas la reprezentantoj de la sidejoj, zorgas pri la celo, ke la sperto estu komuna.

### **Kiu estas la rolo de Esperanto**

IKIKO celas trafi neesperantistojn. Ĉefe estas neesperantistoj, kiuj partoprenas. Sed Esperanto estas klare rimarkebla ĉie. Do IKIKO montriĝas kiel nerekte metodo spertigi partoprenantojn pri la taŭgeco de Esperanto kiel komunikilo en internaciaj eventoj.

Esperanto estas la lingvo de COG kaj Civiciencia. Do la teknika kaj organiza flankoj okazas Esperante. Ankaŭ Esperanto estas la ĉefa lingvo por la celo atingi komunan senton partopreni en la sama sperto internacia, interlingva, interkultura. Ĉiu sidejo selektas la lokajn materialojn, kiuj estos tradukitaj en Esperanton kaj elektas la tradukitajn materialojn de aliaj sidejoj, kiuj estos tradukitaj en la lokan. Tiel la sidejoj kunhavigas siajn unuojn.

La programo estas komuna. Tie oni povas trovi la unuojn de ĉiuj sidejoj kaj libere elekti viziti aŭ partopreni. Ĉiuj titoloj kaj resumoj estas legeblaj kaj per la loka lingvo kaj per Esperanto, krom la eblo esti montritaj per aliaj lingvoj.

Kvar sidejoj en tri kontinentoj

IKIKO 2021 okazis inter las 16an kaj la 20an de decembro. Vi povas scii pri la preciza programoj kaj sidejoj per la ligilo <https://xurl.es/ikiko>. La plano estis ambicia kaj sen antaŭaj spertoj. Do pluraj homoj ne bone komprenis la projekton. Eblaj sidejoj el Ameriko, Afriko kaj Azio komencis piediri, sed ili fine ne sentis sekurecon kaj decidis atendi la veran okazaĵon. La realaj sidejoj estis:

- Lingva Justeco. Hispanio. La plejmulto el la prelegoj estis sciencaj kaj temis pri la pluraj flankoj el la maljusteco pri la kundimensio de la lingvo, la kulturo kaj la popolo. Malgraŭ tio, ankaŭ la partoprenantoj spertis praktikajn atelierojn kaj diskutrondojn. La sidejo okazis duone neĉeeste duone ĉeeste kun samtempa zoom-videviglo.
- Kreema Insurekcio. Hispanio. La sidejo ĉefe aranĝis prelegojn pri la edukada vidpunkto de la kunvivado inter kulturoj, artoj kaj lingvoj. Kelkaj partoprenoj venis de aliaj landoj kaj popoloj, kunaranĝante tri malsamajn lingvojn. La sidejo okazis plene neĉeeste.
- Interkulturaj Komunikadoj. Peruo. La sidejo atingis partoprenojn de sciencistoj, fakuloj eksteruniversitataj kaj kamparaj spertuloj. Ĉio rilatis al Bone Vivi, tiel ke ĉiu tago estis deducita al iu el ĝiaj flankoj: bone sani, bone naski, bone manĝi kaj bone eduki. La sidejo okazis neĉeeste.
- Interkultura kalejdoskopo. Irano. La sidejo, kiu okazis neĉeeste, elektis okazi samtempe perse kaj Esperante per ambaŭdirekta interpretado. La kontribuoj temis pri arto, medicino kaj sporto. Ankaŭ la sidejo sukcese eksperimentis dum la jaro 2021, organizante eventojn sub la nomo kaj antaŭpretigo de IKIKO.

### **Kio reale okazis pri Esperanto**

Pro kelkaj kialoj, Esperantujo ne partoprenis IKIKO-n, krom la escepto de IREA. Do, la dekomencaj planoj pri la videviglo de Esperanto estis trione atingitaj. Ĉiuj partoprenantoj sciis pri la rolo de la internacia lingvo, ĉiuj titoloj montriĝis ankaŭ Esperante, sed kongresanoj ne spertis la deziritan etoson, krom la kunveno okazita inter la reprezentantoj de sidejoj. Tie Esperanto estis la lingvo de la tradukoj, kiu ebligis la kunvenon. Neesperantistoj diris poste, ke tiu sperto estis alloga, kortuŝa kaj scivolemiga.

### **Kion ni planas por IKIKO 2022**

Kolombio fakte aliĝis al la teamo. Sudafriko, Tanzanio, DR Kongo, Usono kaj Meksiko, kiuj atendis ekzemplon de vera okazaĵo de IKIKO, havas jam la kriterion realigita. Kaj Esperantujo devas esti klare engaĝigita en tia oportuno sperti veran internacian interkulturan interlingvan eventon, kie la nehegemonieco estas la ĉefrolo.

Dum ĉi tiuj monatoj antaŭ la evento, COG kaj Civiencia planas disponigi la materialojn, publikigi senpagan libron de kontribuoj, fortigi la sidejojn de 2021 kaj stimuli pliajn. Tamen, la ĉefa celo estas reale atingi la engaĝiĝon de Esperantujo. Ni bezonas esperantistojn, kiuj egligu la videbligon de Esperaton pere de siaj partoprenoj kiel prelegantoj, atelieristoj kaj tradukistoj.

IKIKO 2022 okazos en novembro, je la tagoj decidotaj de COG.

Kontakto: [viko@civiencia.io](mailto:viko@civiencia.io)

# NORMANDAJ (kaj pikardaj) KRONIKOJ

Lastan aŭguston, mi vojaĝis al norda Francio. En mia kroniko mi fokusiĝas en la vizititaj lokoj kaj vidindaĵoj, kiujn mi observis. Mi devas danki miajn gastigantojn Yves, Anne-Marie, Matthieu kaj Céline pro ilia bona emo sed mi preferas ne paroli pri iliaj hejmoj, ilia familio aŭ ilia bonvenigo por ne ĝeni ilin.

Mia vojaĝo komenciĝis en la flughaveno de Zaragozo. Estis malmultaj pasaĝeroj. La plej eksterordinara afero estis, ke kunvojaĝantoj aŭ parencoj, kiuj ne vojaĝis, ne rajtis esti ie iajn en la flughaveno, ne nur en la antaŭfluga atendejo, do miaj onkloj, kiuj veturis min tien, restis nur kvin minutojn proksimume.




En la aviadilo mi esperis havi francan homon apud mi, kiu volus paroli, sed mi relative ne tro bonŝancis havi hispanan paron kun bebo, do ni apenaŭ parolis.

Surteriĝinte mi rimarkis poŝtelefonan malkomfortaĵon: mi ne havis signalon, do mi povis uzi vifion, sed ne ricevi aŭ fari alvokojn nek navigi per datumoj sen vifio. Tio daŭris la tutan semajnon. Mi atendis sms-on de la hotelo kun kodo kiu ebligus min eniri mian ĉambron. Ili sendis tion dum mia flugo, do mi devis telefoni hoteles-

tron ekde ĉiovendejeto por ekhavi ĝin.

En Beauvais mi vizitis la katedralon, kiu ja estas vizitinda. Fakte, mi jam estis en Beauvais unufoje kaj ne havis la okazon viziti ties imponan katedralon. En ĝi la alteco de la monumento kaj la astronomia horloĝo aparte elstaras.

Ĉe la turisma oficejo, post tio, ŝajnis al la akceptisto normale, ke la bus- kaj la trajn-stacidomoj estas disigitaj. Aldone, ŝi ne demandis mian originon kvankam mi menciis Hispanion, do oni postulis de ŝi noti tiun statistikon aŭ ŝi forgesis.



Surstrate mi aŭdas plejparte francojn de afrika aŭ araba influo. Mi suspektas, ke estas ĉar francoj de eŭropa origino ferias, parolas malmulte aŭ parolas duone frustrante. Ne mirinde, ke mi trovas anoncojn por aŭdaparatoj; ili devas konstante streĉi siajn orelojn.

Post la mallonga restado en Beauvais, mi devis preni du busojn kaj unu trajnon ĝis Le Havre. La ŝoforo de la unua buso ne portis maskon sed li apudhavis grandegan plas-

ton, kiu apartigis lian kajuton de la pasaĝeroj. Kvankam antaŭ ol foriri li havas ĝin alŝutita. Kaj ĝi ne malaltigas ĝin forirante. Ĉiuj pasaĝeroj respektis la maskan devigon. Nu, virino forprenis ĝin iam por paroli telefone per Nokia. Mi rimarkis laboriston de la trajnkompanio SNCF apud la buso kiel en trajnstacio. Neniam mi vidis tion en Hispanio. Unu el la celataj urbetoj havis nomon Eu. Ege mallonga! Aliaj urboj kun amuzaj nomoj estis: Songeons (Ni revu) kaj Bury (enterigi)... Aliaj sur la vojo aŭ proksime estos Saint-Saëns, kiel la komponisto, kaj Bosc-Bordel, kun tombejo de nigraj tomboŝtonoj apud la preĝejo.

De mia busfenestro mi legas “Julien Truffaut Ĝardenlaboro”. Mi konas la samnoman filmreĝisoron François. Mi demandas al mi, ĉu ĝi estas ordinara familia nomo? Ĉe la



ĉirkaŭaĵoj de Marseille-en-Beauvaisis estas tri grandaj lavmaŝinoj apud benzinstacio. Lavejojn en urboj mi vidis, sed neniam en benzinstacioj! Ĉu tio oftas en Francio?

La plej ofta pejzaĝo laŭ la vojo estas bovinoj paŝtantaj. La dua buso, Mercedes, granda, iris laŭ vojo, kiu apenaŭ permesis la cirkuladon de du aŭtoj



Mi okulumis malgrandan komiksan ekspozicion ĉe la stacidomo de Rueno sed mi ne revidis ĝin, ĉar de Rueno al Amiens revene mi estis ironta per buso.

En Havro (Le Havre) la hotelo estas tuj kontraŭ la stacidomo. Longaj avenuoj fendas la urbon sed estas malfacile perdi sin: per nur unu turno oni atingas la maron. La plaĝo estis bela sub la kuŝanta suno sed ŝtoneta.

En kebabvendejo hotelrevene mi profitas por pene ekzerci mian turkan. En Hispanio preskaŭ ĉiuj tiaj vendistoj estas pakistananoj.

Mi malkovras ke en Francio estas logoo, simbolo de la notarioj. Mi jam ekvidis en Beauvais, kaj en Havro mi konstatis, ke ĝi ne estas escepto: ĝi estas ora telero kie aperas mitologia figuro.

La sekvan matenon Jean-Marie kaj Yves venis kaj helpis min viziti la urbon. Ni supreniris aŭte al monteto, kiu atestis la ĉeeston de belgoj dum la Mondaj Militoj kaj kiu permesis al ni admiri la normandan ĉielon. Post tio, Yves kaj mi eniris la muzeon MuMA. La provisoraj ekspozicioj estis interesa, kaj krome estis verkoj de lokaj pentristoj tiel kiel Boudin aŭ Dufy.

Tuj poste ni renkontis Gabin, freŝbakita Esperantisto kiu loĝas tie en Le Havre. Je mia reveno en Hispanion, mi aŭdis en la radia programo *Les grosses têtes*, ke Gers estas la sola franca departamento, en kiu ĉi tiu nomo estas je la kapo de la klasifiko de la modaj viraj nomoj.

En Caen kun Yves mi vizitis la du famajn *vir-* kaj *virincelaj* abatejoj. La urbodomo estas surprize granda sed ne ĉie vizitebla.

Posttagmeze ni iris al Bayeux kie seĝas la fama brodtapiŝo, 64-metra, senĉesa. Oni ne povis foti ĝin bedaŭrinde, sed almenaŭ la aŭdgvida klarigo estis trafa kaj detale kondukas onin tra la scenoj. Jen komiksa anekdoto: antaŭ la vojaĝo mi komencis legi albumon de Arthistorio, volumo Mezepoko. La brodtapiŝo de Bayeux estas fakte la komenco de la dua ĉapitro, post la antaŭromanika arto en norda Hispanio. En Caen mem gazetisto intervjuis min tuj post prelego por Esperantistoj pri Aragono.

En Rouen Matthieu kaj Céline gastigis min. Mi kun Matthieu supreniris la Horloĝturon, post 15-minuta atendo pro kontraŭvakcino aŭ almenaŭ kontraŭvakcinatestila manifestacio. Bona ekzemplo de pronomo *en* por miaj lernantoj: “*Le pass sanitaire, on n’en veut pas*”, kriadis partoprenantoj. Fakte mi devis prezenti mian vakcinatestilon en muzeoj, stacidomoj, restoracioj, sed ne preĝejoj. Tio iom surprizis min ĉar mi vizitis la preĝejojn kiel muzeojn.

La stratoj de Rouen estas belaj kaj ĉie oni havas la senton ke subite oni povus trovi sin en Mezepoko. La fera katedrala turo ŝokis min komence sed poste mi akceptis kaj eĉ admiris ĝin. Belis la du lumsonaj (aŭ sonlumaj) spektakloj sur la fasado de la katedralo sed mi devas agnoski, ke mi preferis tiun en...

Amiens: tre altkvalita spektaklo, kiu montris multkoloran kaj realan version iam en sia historio. Ni tre kutimas vidi praajn konstruaĵojn en ilia nuda ŝtono, sed tio ne signifas, ke ili ĉiam aspektis tiel. Ankaŭ ene la katedralo estas elstara. Mi aparte rimarkis ruĝan Kriston de la skulptisto Delaborde.

En Amiens krome mi enpaŝis la lastan domon de la verkisto Jules Verne. Ĉar Amiens estis la fino ŝtupo de via vojaĝo, mi decidis aĉeti librojn ĉefe en tiu ĉi urbo. Ankaŭ en Rouen mi aĉetis kelkajn. Mi preskaŭ maltrafis la librejon Aléatoire pro la stranga numerado de la strato. Estis kiel pluraj 62, ĉu tio oftas en norda Francio? Nu, la pordo estis mallarĝa kaj ne tro videbla de for. La Pikardian muzeon mi ne vizitis sed la klarigaj surs-trataj afiŝoj de iuj verkoj estis interesaj.

Mi aĉetis gazeton (Le Courrier Picard) kaj revuon en PMU-trinkejo. Loka ekzaltita junulo spektadis trotan ĉevalan vetkurdon antaŭ televido. Ŝajne li fine gajnis 600 €. Mi faris simplan demandon kaj la trinkejestro respondis bruske al mi, ke li ne scias, ke li bruske legas la lokan ĵurnalon. Mi ne ŝatus ĝeneraligi, sed mi havas la impreson, ke la normandoj estas pli serenaj, formalaj kaj trankvilaj kaj la pikardoj pli ekzaltitaj, parolemaj kaj bruskaĵoj. Sed kompreneble, mia sperto limiĝas al kvin aŭ ses homoj, preskaŭ ĉiuj rilataj al gastamo aŭ klienta servo.

Fine, pri hoteloj, ŝajnas, ke ia kusena afero estas konstanto. Ĉiuj litoj havas grandajn kapkusenojn sed malaltaj. Kaj denove frapis min la fakto ke frizistoj, kiel mi vidis en Saint-Gaudens iam, emas nomi siajn negocojn per malbonaj vortludoj: Créa'tifs, sympa tifs en Beauvais, Le Festiff en Le Havre... En Rouen mi legis Ô coiff 'heure. En Caen Atmosph'hair...

Tiu vortluda fenomeno ne okazas en mia lando.

Verkis  
Eduardo Berdor

# Iom da matematiko (6) ...

## Mezuro de deklivo.



Ni ĉiuj iam vidis la apudan trafikplaton flanke de autoŝoseo. Sur ĝi estas skribite numero kaj la matematika simbolo por elcento (%).



Laŭ la grandeco de tiu numero ni ricevas informon pri la deklivo de la ŝoseo kaj ni povas imagi ĉu temas pri krutaĵo aŭ pli milda suprenirado aŭ malsuprenirado.

Same, kiam oni okazigas biciklan konkurson kaj la


biciklantoj devas grimpi altan monton kun fortaj deklivoj, eblas vidi en ĵurnaloj grafikaĵojn kiel la ĉi apudan, en kiu oni priskribas la deklivojn de longa suprenirado pere de numeroj kun la simbolo %.

### ANGLIRU

Altitud:	1.572 m
Distancia:	12,4 km
Desnivel:	1.266 m
Pend. Media:	10,21%
Coefficiente:	514




Kion signifas tiuj numeroj? Kiamaniere oni kalkulas ilin?



Ni imagu ke ni veturas ene de aŭtomobilo kaj ke ni supreniras deklivon. Por mezuri ĉi lastan ni desegnu skeman bildon: unue, ni elektos parton de la ŝoseo, kies deklivon ni mezuros, t.e., distanco "D", de la punkto "A" ĝis la punkto "B".

Kiam la aŭtomobilo supreniras de A ĝis B, ĝi gajnas altecon "h".






Fine, ni konsideru la distancon “d”, kiun trairus la aŭtomobilon se la ŝoseo estus tute glata

Kun ĉio ĉi, ni povas jam kalkuli la mezuron “m” de la deklivo per simpla divido:  $m = h/d$ . Sed tio ne estas tiel

simpla ĉar “d” troviĝas sub la tero.

Jen ekzemplo: imagu ke vi supreniras montopasejon ene de aŭtomobilo kaj scivolemas pri la deklivo de la ŝoseo inter la punkto “A” kaj la punkto “B”. Unue, vi mezuras la distancon de “A” ĝis “B” sur la ŝoseo mem: ni supozu ke ĝi estas 20 m. Ni ankaŭ supozu ke vi havas altecmezurilon, kiu permesas scii ke altdiferenco de “A” ĝis “B” estas 2 m. Sed, kiel dirite, ni ne povas rekte mezuri la distancon “d”, kiun ni trairus se la ŝoseo estus tute glata, ĉar tiu parto troviĝas subtere. Tamen, ni ne priokupiĝu!.



Ĉu vi memoras pri la fama Teoremo de Pitagoro? Ĝi alvenas por helpi nin. Ni memoru ke


$$20^2 = 2^2 + d^2 \text{ . De ĉi tio,}$$

$$d^2 = 20^2 - 2^2 = 400 - 4 = 396$$

Sekve,  $d = 19,90$

Kun tio, la mezuro de la deklivo estus  $m = 2/19,90 = 0,10$ , kio egalas al 10%

Kaj por fini tiun-ĉi artikoleon, jen demando: Se iam ie ni vidus atentigan signalon, kiu montras al ni deklivon 100%-an, ĉu tio signifas ke ni renkontos antaŭ ni vertikalan muron?



Respondo estas “tute ne”. 100%-a deklivo troviĝus tie, kie, en la antaŭaj bildoj, h kaj d havas saman longecon kaj tio okazas nur kiam la angulo “α” mezuras 45°. Temas pri ege kruta deklivo, kiu tamen, de tempo al tempo, troviĝas en montaroj, sed certe ne temas pri vertikala muro staranta antaŭ ni.

Jesús M. García Iturrioz  
jmgiaa@hotmail.com

